

7



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

JULIO 1963

ENHAVO

	Paĝo
* * * Ĉiujn fortojn por la kongreso	1
* * * 3300	2
* * * La asocia sekretario vizitis societojn	3
B. Tornado. Kuraĝe (versaĵo)	3
Atanas D. Atanasov — Ada. Deknaŭa leciono	4
Violin Oljanov. Pri la Esperanta stilo	6
* * * Adresaro de la Esperanto-societoj en Bulgario	7
* * * Novaj Esperantaj eldonoj	9
Marija Bajreva. Esperanto en la ekonomia lernejo „V. Levski“	9
Tibor Sekelj. La mesaĝo de la faraonoj	10
TRA LA GAZETARO	12
ORGANIZA VIVO	13
* * * Kunsido de la estraro de BEJ	14

Abonkotizo : jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2 lv 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.

Reklamtarifo : 0,15 levoj por cm²; korespondanoncoj : 5 stotinkoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5

SOVETUNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul 52/54 kv. 19, Moskva, B—162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



ĈIUJN FORTOJN POR LA KONGRESO!

Ni, la bulgaraj esperantistoj gastigos la plej amasan postmilitan universalan kongreson de Esperanto. Se al la amaseco ni aldonus ankau bonan organizon, ni povus havi la plej imponan kongreson, pri kiu oni rakontus longajn jarojn. Ja tio ĉi dependas nur de ni. Eble ne ĉiu povas nun imagi kiel grandan efikon propagandan havos tiu ĉi grandioza okazintaĵo, kiel en nia lando, tiel ankau eksterlande. Ĝi montriĝas ankau nun, antaŭ la kongreso. Esperanto estas enkondukita kiel libervolan lernobjekton en tri altlernejojn de nia lando kaj en la gelernantajn studrondojn de ĉiuj mezlernejoj. La intereso en la lando al la internacia lingvo kreskis kiel neniam. La du sinsekvaj eldonoj de la lernolibro tuj elĉerpigis. Kun granda senpacienco estas ĉie atendataj la aperoj de la Esperanto — bulgara vortaro, de la frazaro, de la gramatiko. Ĉie, en urboj kaj vilaĝoj, oni demandas pri lerniloj.

Post la decido pri la okazigo de la 48-a UK en Sofio aperis dek novaj E-societoj. Formiĝis multaj grupoj en urboj kaj vilaĝoj, kiuj strebas estiĝi societoj. Multaj societoj klopodas realigi antaŭ la templimo la decidon de la pasintjara kongreso en Burgas pri plimultigo de la asociaj membroj al 6000. Multaj societoj honore al la 48-a UK antaŭpagis al la Asocio la membrokotizon por la tuta 1963. Tiaj imitindaj societoj estas: en urbo Sofio („M. Gorkij“) — paginta por 402 membroj, en Ruse („Danuba Studento“) — 40 membroj, Asenovgrad — 66, Dimitrograd („Internacia Amikeco“) — 52, Ĉirpan — 22, Gabrovo 50, Goce Delĉev — 22, Kubrat — 20, Karlovo — 48, vilaĝo Ljubimec — 20, urbo Nova Zagora — 21, vilaĝo Panĉarevo (Kjust.) — 16, urbo Pazarĝik — 85, Peŝtera — 40, Ruse („Dimitrovec“) — 40, Ruse („Ponto de l'Amikeco“) — 35, Sevlievo — 70, Sofio („Heroldo“) — 62, vilaĝo Satrovo (Kjust.) — 15, Stara Zagora — 210 (brave!), Târnovo — 41, Vazovgrad — 18 kaj aliaj. Societo „Septembra Gloro“ en la ne granda urbo Mihajlovgrad havas admirindan sukceson — 183 membroj pagintaj la kotizon por la tuta jaro! Des pli granda estas tiu ĉi sukceso, konsiderante, ke tiu ĉi societo nur antaŭ unu-du jaroj letargiis. La rapidan supreniron ni ŝuldas al la membro de CK de BEA Asen Penkov. Dank' al lia senlaca klopodado fako „Klerigo“ de la Distrikta Soveto en Mihajlovgrad aranĝas someran pedagogian kurson por instruistoj de Esperanto. Tiam kurson aranĝas ankau la societo en Pazarĝik.

Ni gratulas kaj dankas al tiuj ĉi societoj kiuj ne ŝparas fortojn por bone sin prezenti al la kongreso, kun digno kaj fiero renkonti la karajn eksterlandajn gastojn. Sed bedaŭrinde ne ĉiuj societoj havas tian agrablan senton. Ekzistas societoj kiel tiu ekzemple en Burgas, kiuj ĝis nun ne pagis eĉ por unu membro, eĉ por unu monatprio. Evidente, tiaj societoj ne kontri-

(daŭrigo sur p. 2)



S O F I O 3-10 VIII 1963

3 3 0 0

Por bona ordo. Oni povas imagi kiel malfacila tasko estas organizi tiun amasan kongreson. Jen pro kio oni devas tre severe observi la starigitan ordon. En la kongresa akceptejo estos giĉetoj por la diversaj aktivecoj. Estos ankaŭ giĉeto por informado. LKK petas, ke ĉiuj kongresanoj sin turnu nur al la servoj de tiuj giĉetoj. Kiuj ne antaŭpagis loĝejon aŭ ekskurson en la difinita templimo, ne rajtas insisti pri tio, ĉar ili estis avertitaj pri la limdatoj.

Veturado tra la urbo. En la kongresa akceptejo estos vendataj je malalta prezo kartoj por veturado per ĉiuj tramoj, autobusoj kaj trolebusoj de la ĉefurbo. Ili validos dum la kongresaj tagoj.

Kongresanoj. Laŭ informo ĝis la fino de junio al la kongreso aliĝis 3300 gekongresanoj el 43 landoj. **Per tio 48 Universala kongreso en Sofio definitive prezentigas kiel la plej amasa postmilita kongreso.** Tiuj rezultoj tamen ne estas definitivaj. Tiam en UEA ankoraŭ ne estis ricevataj ĉiuj aliĝiloj. LKK plu ne akceptas aliĝojn.

Gazetara konferenco. La 6-an de junio j. k. en la Asocio de la Bulgaraj Ĵurnalistoj okazis gazetara konferenco kiun partoprenis reprezentantoj de la sofiaj ĉiutagaj ĵurnaloj, de BTA, la Radio, la Televido k. a. Prezidis la konferencon la vicprezidanto de la Asocio de la Bulgaraj Ĵurnalistoj Ilija Kjuljovski, kiu donis la parolon al la prezidanto de Lo-Ko-Ko Nikola Aleksiev. Tiu rakontis al la ĉefurbaj ĵurnalistoj pri la preparo kaj la programo de la 48-a UK kaj de la 19-a Kongreso de TEJO. Post tio la parolo estis donita al la Konstanta Kongresa Sekretario G. G. Pompilio, kiu klarigis la strukturon, la celojn kaj la agadon de UEA. Rezulte de la gazetara konferenco je la 6-a kaj la 7-a de junio en la sofiaj ĵurnaloj kaj en la radio-disaŭdigoj aperis detalaj sciigoj pri la kongresoj.

(daŭrigo de p. 1)

buas por la bona prezento de nia movado antaŭ la tutmonda movado. Ni esperu, ke ankaŭ ili okupos dignan lokon en nia verdstela armeo!

Se tiaj sukcesoj ni havas nun, antaŭ la kongreso, post ĝia bona efektivo la akiroj estos certe ankoraŭ pli grandaj. Sed por la bona okazigo de tiu granda aranĝo estas necesaj la fortoj kaj la kapabloj de ĉiuj niaj aktivuloj. LKK sin turnis al ĉiuj societoj kun peto, ke ili disponigu al ĝi siajn plej bonajn membrojn por la diversaj antaŭ- kaj dumkongresaj laboroj. Memkompreneble por ke bone funkciadu la granda maŝino de la organizantoj, estas necesa fiera disciplino. Bone armitaj per alta lingvo-kono, per esperantista idealismo kaj sindono, per patriotisma konscio kaj internaciisma helpemo ni streĉu niajn fortojn kaj volon por brila elteno de la ekzameno!

Se ni bone semos, abunde ni rikoltos.



LA ASOCIA SEKRETARIO VIZITIS SOCIETOJN

La sekretario de CK de BEA Violin Oljanov vizitis en la lasta monato la societojn en Mezdra, Kneja, Orjaĥovo, Nikopol, Svištov kaj Levski. Ĉie li konatigis al la membroj la lastajn novaĵojn de la Esperanta mondo, kaj precipe la preparajn laborojn por la 48-a Universala Kongreso en Sofio kaj la 19-a Kongreso de TEJO en Vraca. Li donis konsilojn pri la organiza stabiliĝo de la societoj kaj pri digna renkonto de ambaŭ kongresoj, por bona prezento de la bulgara Esperanto-movado.

Societo „Vapcarov“ en Mezdra, kiu funkciis bone dum la pasintaj jaroj estis trafita en riproĉinda stato: nek kursoj, nek kunvenoj, nek kia ajn agado. K-do Oljanov renkontiĝis kun la sekretarioj de la Urba Komitato de BKP kaj preparolis la plivigligon de la societo. Tiuj promesis helpi. Estis tuj fiksita la dato de la jarkunveno, kiu jam okazis. La prezidanto Gruev kaj la kasistino Colova promesis tuj eklabori por revigligo de la societo.

Societo „Agro“ en Kneja havis en la momento du kursojn, kiuj estis vizititaj de la asocia sekretario: por ĝelerantoj kaj por civitanoj. Estas ĝojinda fakto ke ili estas vizitataj de 7 ĝeinstruistoj. La societo havas 16 membrojn. Oni ne varbis ankoraŭ novajn membrojn el la kursoj. La societo organizis tri publikajn prelegojn de la CK-ano Radoslav Triĉkov el Vraca. Oni direktis al la sekretario kelkajn demandojn precipe pri lerniloj.

Societo „L. L. Zamenhof“ en Orjaĥovo konforme al la kongresaj decidoj kaj al la decidoj de la Dua Plenkunsido de CK de BEA pligrandigis la nombron de sia anaro de 31 al 40 (gratulon!). La klubejo estas malfermata ĉiun lundon kaj ĵaŭdon. Estis gvidata kurso de 16 personoj, kiuj jam korespondas. Regule estas disaŭdigataj propagandaj prelegoj. Oni tuj prenis intervjuon de la sekretario pri la okazontaj en nia lando internaciaj kongresoj, kiu estis disaŭdigita la saman tagon. La estaro de la societo proponis al la Urba Soveto grandan liston da entreprenoj konekse kun la kongreso en Vraca kaj la planata ekskurso al insulo „Esperanto“. K-do Oljanov vizitis la sekretariojn de la Urba Komitato de BKP kaj la prezidanton de la soveto kaj preparolis tiujn demandojn. Ĉiuj montris tre favoran rilaton kaj promesis helpon. La asocia sekretario vizitis ankaŭ insulon „Esperanto“ kaj estis ravita de la ĉarma loko.

La societo en Nikopol estas nova, tamen ĝi funkcias tre bone. Oni havas du rondojn: por lernantoj kaj por civitanoj. Eksciente pri la sperto de Jambol (per „Bulgara Esperantisto“) oni disaŭdigas ĉiulunde prelegojn (ĝis tiam oni disaŭdigis 26!). Al la sekretario oni direktis multajn demandojn. Oni esprimis opinion,

ke okaze de la enkonduko de Esperanto en la lernantajn studrondojn oni devas organizi kursojn por instruistoj.

En Svištov ekzistas du societoj: civitana kaj studenta. La lasta, kvankam nova funkcias pli bone. En la altlernejo 40 ĝestudentoj studis fakultative Esperanton kaj oni faris ekzamenojn. En la civitana societo ne ekzistis konkordo, pro kio oni ne sukcesis organizi ĉiujn esperantistojn en la urbo. Oni havas kurson de dek personoj gvidata de Bejko Markov el Levski. La asocia sekretario Oljanov renkontiĝis kun la sekretarioj de la Urba Komitato de BKP kiuj evidentigis esperantistoj kaj havas tre favoran rilaton al la plifortigo de la societoj. Ili promesis disponigi klubejon kaj doni ĉian helpon. La prezidanto de la societo promesis aktivigi, likvidi ĉiajn miskonceptojn kaj plifortigi la organizan staton de la societo.

En Levski ekzistis du societoj, sed pro malagemo de la fervojista societo, ili fakte kunfandiĝis kaj nun havas 31 membrojn. Oni gvidas kurson por komencantoj de 16 personoj kaj por progresintoj de 8 personoj. Oni direktis diversajn demandojn precipe pri eldonotaj lernolibroj, gramatiko, vortaroj, pri centra kurso por instruistoj. Ĉie oni esprimis sian kontenton pri la vizito de la asocia sekretario kaj pri la helpo kiun li donis per tio al la societoj.

KURAĜE

Neniam donos viv' trankvilon,
kaj ĉie trovos vin event';
kaj de inunda vivtorent'
serĉados vane vi azilon.

Sed vi ne perdu la kuraĝon,
renkonten iru al danger';
paŝante firme sur la ter',
en la batal' akriĝu saĝon.

De aĉaj sentoj kun fervoro
animon purigadu vi
de fijaĵulo kaj envi';
sed por ne kapti vin angoro
aliajn korojn kun atent'
penetru streĉe en silent'.

B. Tornado
Moskvo

Deknaŭa leciono

Ju pli la tempo pasas, des pli malpacienca mi fariĝas.

Fine la tiom atendita telegramo alvenas. Mi legas kaj relegas ĝin:

„Marde dekkvinan vespere alvenos Sofion, Gepetersen“.

La telegramo estas sendita el Târnovo. Geedzoj Petersen veturis vaporŝipe de Kopenhago al Grekujo; ili haltis en Ateno, poste daŭrigis al Konstantinoplo, kie ili ankaŭ restis tri tagojn, de tie ili veturis ankaŭ vaporŝipe al Varna, de Varna ili iris en Târnovon kaj jen ili jam venas Sofion.

La vojo inter Târnovo kaj Sofio estas longa 250 kilometrojn; la veturo daŭras sep aŭ ok horojn.

Marde vespere mi kun grupeto de lokaj samideanoj atendas la karajn gastojn ĉe la Sofia stacidomo. Kompreneble, inter la atendantoj estas ankaŭ miaj amikoj Marko kaj Georgo.

Miaj gepatroj provizore forestas, ili estas en la provinco. En nia hejmo restis nur mi kaj mia fratino. Ni decidis logigi la gastojn ĉe ni. Mia fratino neniam ĝis nun parolis esperante. En la lastaj dek tagoj, kiam ni sciis kun certeco pri la alveno de la gastoj, ŝi komencis lerni fervore la lingvon; ŝi sukcesis tralegi la tutan lernolibron, sed estis maltrankvila, ĉu per siaj rapide akiritaj teoriaj konoj ŝi povus esprimi sin sufiĉe en Esperanto.

Jam duonhoron ni atendas. La vagonaro havas malfruigon de 38 minutoj.

Sed jen en la malproksimo estas videblaj la tri lumetoj de la lokomotivo. Ju pli proksimiĝas la vagonaro, des pli klare oni distingas la apartajn vagonojn.

La vagonaro alkuras kun bruo. Niaj rigardoj estas fiksitaj al la fenestroj de la vagonoj. Jen ĉe unu fenestro estas svingata malgranda verda flageto — la Esperanto-standardo. Ni ĉiuj ekkuras al tiu vagono, donante mansignojn.

Jen la karaj gastoj... karaj manpremoj, floroj, rapidaj bonvenigaj vortoj... Marko kaj Georgo ĵetas sin en la vagonon kaj helpas la gastojn elporti la pakajojn.

— Vi certe estas tre lacaj pro la longa veturo?

— Ho, la tuta laceco jam pasis, kiam ni vidis vin... Kaj ĉie estis tiel Tamen ni bezonas iri al la hotelo, por aranĝi nin, kaj poste...

— Bonvolu, jen per tiu aŭto ni iros. Samideanoj, post du horoj ni kolektiĝos ĉiuj en restoracio „Stelo“ por komuna vespermango kun la gastoj.

La aŭto haltas antaŭ nia loĝejo.

— Sed ĉu tio estas hotelo?

— Vi estas niaj gastoj. Estu bonvenintaj en nian hejmon.

— Sed...

— Nenia „sed“. Mi petas, bonvolu eniri vian ĉambron.

S-ino Petersen ekstaras ĉe la sojlo de la ĉambro, kunfrapas la manojn kaj ekkrias:

— Ho kia ĉarma loko! Vidu, Krisĉjo, la freŝajn florojn en la vazo... La fenestro rigardas al ĝardeno...

— Jes, aldonas Petersen ravite — kaj ankaŭ la skribtablo estas pretigita por mi: mi vidas paperon, inkujon, plumingon... Certe tion mi nun bezonas. Sed kiel mi povus esprimi nian dankon pro tia granda gastamo?

— Ho, vidu tiujn ĉi antikvajn kandeligojn sur la kameno... Ĉu ili ne memorigas al vi pri io tre bela, tre intima el la pasinteco?... Oni tute ne sentas sin fremda, kiel en hotelo...

— Kara mia, ĉu vi ne sentas, ke ni estas en Esperantujo?

PROVERBOJ

Pro amo al la kandelo kato lekas kandelington.

Glavo ne estas danĝera, ĝis kiam ĝi ripozas en la glavingo.

Ju pli granda la deziro, des pli kara la akiro.

For de l'okuloj, for de la koro.

SUFIKSOJ

ING — objekto, en kiu estas enigata aŭ enmetata alia objekto por oportuna uzo aŭ servo.

plumo — plumingo

kandelo — kandelingo

glavo — glavingo

NOTINDAJ VORTUZOJ KAJ ESPRIMOJ

La vorto **for** kiel interjekcio esprimas ordonon (ordinare malĝentilan) aŭ severan inviton al iu persono malproksimiĝi, lasi la lokon, kie estas la parolanto. Uzata kiel prefikso ĉe verboj tiu vorteto ²entenas la saman signifon:

Ni jam foriras=ni ne restas en tiu ĉi loko, ni iras malproksimen de ĝi.

Li forportis sian valizon.

Ili fordonis ĉion, kion ili posedis.

Li forprenis sian monon.

Oni forrabis al li la horloĝon.

Forkuri, forflugi.

Kelkakaze ĝi signifas ankaŭ, ke la ago estas farata plene, ĝis fino, sen resto:

Mi formangis la panon=mi mangis la tutan panon kaj el ĝi restis nenio.

Mi fortrinkis la vinon=mi trinkis la vinon ĝis lasta guteto.

La vino forfluis.

JU PLI..., DES PLI..., =kiom pli..., tiom pli...

Ju pli juna, des pli forta (la juneco kaj la forto estas en la sama grado, ili estas en rilato de rekta proporcio).

Ju pli da mono, des pli da plezuroj, des malpli da zorgoj — tia estas la filozofio de la praktikemaj homoj.

EKZERCOJ

1. La kudristino metas al sia fingro . . . , por ne piki ĝin per la kudrilo.

2. Ju pli li mangas, . . . kreskas lia apetito.

. . . mi pensas, des pli mi konvinkiĝas, ke li ne estas prava.

3. En la subaj frazoj anstataŭigu la kursivajn vortojn per aliaj samsencaj esprimoj:

Mi ne estas *riĉa homo*. Plezure li akceptos vian inviton. Tiu ĉi teksto *ne estas komprenebla*. Via plano estas *realigebla*. *Iufoje* li rakontis al mi interesan epizodon el sia vivo.

ЗА ЕСПЕРАНТСКИЯ СТИЛ*

Под стил на езика разбираме система от отличителни езикови средства, които използваме в зависимост от целите на нашата реч и нейното съдържание. Ние лесно можем да различим стила на една вестникарска статия от стила на художествено произведение. В последното се подбират особени „поетични“ думи, използват се сравнения и други литературни фигури, които придават по-голяма образност на произведението и по такъв начин авторът въздейства по непосредствено на читателя, на неговите чувства.

Различаваме делови стил, стил на художествената реч, стил на публицистичната реч, стил на научно-популярната литература и т. н.

Определяйки така понятието стил, за нас става ясно, че не може да се говори за стил на отделните езици, напр. за френски стил, немски стил, руски стил и т. н. И все пак всеки език си има някои особености. Често ние говорим за непреводими думи и словосъчетания. Ние говорим условно за есперантски стил, като разбираме под това различните видове стил, приложени в международния език Е. Последният е рационално съставен език, чийто строеж е основан предимно на логиката. Той е нов език, със съвършено кратка история и следователно, неговите стилове още не са така разработени от големи писатели и публицисти, както това е направено в течение на столетия в развитието на националните езици. В него няма изработени трайни словосъчетания (идиоми), чийто смисъл се отклонява значително от значението на отделните думи, които го съставят.

Есперантският словоред е свободен. Той е подчинен само на логиката. Затова обикновено есперантското изречение има следния строеж: подлог, казуемо, допълнение. Предложните допълнения обикновено предшествуват преките. Ако има обстоятелствени думи те най-често стоят непосредствено до глагола, но те са най-подвижните елементи на изречението и могат да са в началото, в края, между подлога и глагола и т. н. Прилагателните стоят пред поясняваната дума. Наречията за начин — също.

Li kantas tre belan kanton (Z). — Той пее много хубава песен. Via parolo estas tute nekomprenebla, kaj viaj leteroj estas ĉiam skribitaj tute nelegeble (Z). — Вашата реч е съвсем неразбираема и вашите писма винаги са писани съвършено нечетливо. Rakontu al mi vian malfeliĉon, ĉar eble mi povus helpi al vi (Z). — Разкажете ми за вашето нещастие, защото може би, аз ще мога да ви помогна. Ni ĉiuj kunvenis, por preparoli tre gravan aferon (Z). — Ние всички се събрахме, за да обсъдим много важна работа. Mi volonte plenumis lian deziron (Z). — Аз на драго сърце изпълних неговото желание. En malbona vetero oni povas facile malvarmiti (Z). — В лошо време може лесно да се настине.

Обаче, ние често имаме отклонения от тоя спокоен, разказвателен стил. Никакво правило не пречи вместо *mi havas belan libron* да кажем *havas mi belan libron* или *belan libron mi havas* или *belan libron havas mi* или *belan mi havas libron* и т. н. Такова отклонение от обичайния словоред, наречено инверсия, се среща особено често в поезията. Там то е предизвикано главно от метриката и изискванията на римуването.

* Из готовата за печат „Граматика на есперанто.“

Ĉar volis mi sanktan promeson plenumi (Devjatnin). — Защо желяех свещени обет да изпълня. Tre ĉarme ĝi lumis, la suno ravanata, en mia de vivo mateno (Z). — Твърде прекрасно то светеше, слънцето чудно, на моя живот в утринта.

В прозата ние разместваме обикновения словоред, за да подчертаем някоя дума, да сложим върху нея логическото ударение.

Guste la instruistino mi invitis, ne la kuracistino. — Точно учителката поканих, не лекарката. Al vi mi parolas. — На тебе говоря (не на някой друг).

След пряка реч, при обяснителните думи на автора за това, кой говори, обикновено имаме инверсия — подлогът се поставя след глагола.

„Kion vi diras?“ interrompis lin sinjorino Aneto (Devjatnin). — „Какво говорите?“ — прекъсна го госпожа Анета. „Sed li ja estas tute ne vestita“ — subite ekkriis uni malgranda infano (Z). — „Та той е съвсем не обленен!“ — внезапно извика едно малко дете.

Но среща се и обикновеният словоред.

„Ho, se mi jam havus la aĝon de dek kvin jaroj!“ — ŝi diris (Z). — „О, ако, имам вече петнадесет години! — тя каза.

С подходящо разместване на думите в изречението може да се получи по раздвижен стил, можем да постигнем желаното логическо подчертаване, което в говора се засилва със съответната интонация. В това отношение есперантският синтаксис не прави никакви ограничения и дава богати възможности за предаване различни отсенки на мисълта. Важното е, така да подреждаме думите, че мисълта ни да бъде пределно ясна, непосредствено разбираема. Това е напълно в духа на есперанто, който е предназначен за ползуване от трудещите се.

Виолин Олянов

ADRESARO DE LA ESPERANTO-SOCIETOJ EN BULGARIO

En tiu ĉi kajero de BE ni komencas la publikigon de la adresoj de la E-societoj en Bulgario. Ni ordigas ilin laŭ distriktoj. Per tiu publikigo ni celas faciligi la kontaktojn inter la societoj, kaj de apartaj esperantistoj kun la societoj. Se iuj adresoj ne estas ĝustaj, ni petas onin tuj korektigi ilin. La ordigo laŭ distriktoj helpas al la membroj de CK, al la societaj estraroj kaj al la aktivularo vidi la realan distribuon de la societoj sur la teritorio de nia lando. Oni rimarkos, ke en distriktoj kiel tiu de Stara Zagora, Plovdiv kaj aliaj estas po dek kaj pli da societoj, sed en la distriktoj de Varna (I), Silistra, Vidin kaj aliaj ekzistas nur po unu aŭ du societoj. Tio ja estas tre evidenta signo pri la agemo de la membroj de CK kaj de la estraroj de la societoj en tiuj distriktoj. Ni esperas, ke la bildo pri la situo de la societoj, kiun ni disponigas al niaj aktivuloj per tiu ĉi adresaro instigos la kamaradojn en la postrestintaj distriktoj al plifortigo de la propagando, al plibonigo de la organiza laboro kaj al fondo de novaj societoj.

Por ŝpari lokon ni uzas mallongigojn: E.=Esperanto, s-to=societo, s.=vilaĝo (selo). La metita en krampoj nomo de urbo post la nomo de vilaĝo signas la distrikton.

Delonge ni rekomendas al la societoj en la grandaj urboj havigi al si poŝtkeston kaj al tiuj en la malgrandaj urbetoj kaj en la vilaĝoj — interkonsenti kun la poŝtejo, al kiu el la estraro estu transdonata la korespondaĵo por la E-societo. En tia okazo oni povus adresi ekzemple tiumaniere: **„Orjahovo, Esperanto-societo“**. Kaj tio estus eterna adreso. Ne estas necese evidentigi la grandan avantaĝon de tia adresado. Nun ni devas konstante ŝanĝi la adresojn, leteroj perdiĝas, okazas miskomprenoj. Bedaŭrinde tre malmulte da societoj akceptis nian konsilon. La ceteraj obstine prezentas privatajn adresojn. Ni esperas, ke la publikigo de la adresaro helpas ankaŭ al ili konsciiĝi.

DISTRIKTO DE BLAGOEVRAD

1. BANSKO, E. s-to „Pirin-Montaro“ (per Maria Kojareva).
2. BLAGOEVRAD, E. s-to „Espero“ str. M. Petrini 18 (per Georgi Angelov).
3. GOCE DELČEV, E. s-to „Pirin“ str. Lenin 2 (per Borislav Ang. Vălev).
4. PETRIČ, E. s-to „Esperanto Triumfonta“ str. Goce Delčev 8 (per Kiril Hlebarov).

DISTRIKTO DE BURGAS

1. AJTOS, E. s-to Učilište za gluĥonemi (per Denev).
2. BURGAS, E. s-to „Nigra Maro“, P. K. 138.
3. KARNOBAT, E. s-to „Mondpaco“.
4. MICURIN, E. s-to „Amikeco“, BNB (per Ivan Popov).
5. POMORIE, E. s-to „Tr. Ĥristovski“, str. Solna 76 (per Stefan Mihajlov, Samuil I).
6. SOZOPOL, E. s-to „Apolonia“, TPK „Kolektiv“ (per Dim. V. Tomov).

DISTRIKTO DE VARNA

1. VARNA, E. s-to „Albato“, P. K. 11.

DISTRIKTO DE VIDIN

1. BELOGRADČIK, E. s-to „Eĥo de l' rokoj“.
2. VIDIN, E. s-to „Espero“, str. K. Jordanov 15 (per G. Simeonov).

DISTRIKTO DE VRACA

1. VRACA, E. s-to „Sukceso“, str. Tolbuĥin 63 (per Radoslav Tričkov).
2. KNEJA, E. s-to „Agro“ (per Boris Gorniški).
3. MEZDRA, E. s-to „Vapcarov“.
4. ORJAĤOVO, E. s-to „Zamenhof“, str. 9 Septemvri 20 (per Stojko Zlatarski).

DISTRIKTO DE GABROVO

1. s. BATOŠEVO (Gabrovo), E. s-to „Amikeco“.
2. GABROVO, E. s-to „Verda Torĉo“, str. Trakija 32.
3. DRJANOVO, E. s-to „Ivan Vladkov“, str. Iv. Vladkov 21 (per Nejko Nejkov).
4. SEVLIEVO, E. s-to „Fratiga Stelo“, str. Stoletov 6 (per Bonka Mandeva).
5. TRJAVNA, E. s-to „Verda Stelo“.

DISTRIKTO DE KOLAROVGRAD

1. KOLAROVGRAD, E. s-to „Vekiĝo“, P. K. 60.
2. PRESLAV, E. s-to (per d-ro Ganto Vasilev).

DISTRIKTO DE KÂRGALI

1. KÂRGALI, E. s-to „Stelo“, OK na bălgarosăvetska družba.

DISTRIKTO DE KJUSTENDIL

1. KJUSTENDIL, E. s-to „Flamo“, str. Lenin 77 (per Evtim Anev).
2. s. PANČAREVO (Kjustendil), E. s-to „Razmetanica“.
3. STANKE DIMITROV, E. s-to „Marek“, str. V. Kolarov 11 (per Boris Drenski).
4. s. ŜATROVO (Kjustendil), E. s-to „Balkana Konkordo“.

DISTRIKTO DE LOVEČ

1. s. BORIMA (Loveĉ), E. s-to „Nova Mondo“ (per Ĥrišto Vodeničarov).
2. LOVEČ, E. s-to „Espero“.
3. LUKOVIT, E. s-to „Ĥmpeto“, „Peĉatni proizvedenija“ (per Dono Ĥristov).
4. TETEVEN, E. s-to „Verda Stelo“, str. G. Dimitrov 131 (per Iv. Anadolski).
5. TROJAN, E. s-to „Balkana Stelo“ str. Părvomajska 29 (per L. Lalev).

*Kun fera disciplino kaj alta konscio ni renkontu
niajn karajn gastojn — kongresanojn!*

La ŝtata eldonejo „Nauka i Izkustvo“ planis eldonon de jenaj esperantaj libroj en la jaro 1963: „Esperanto-bulgara konversacilibro“ kaj „Esperanto-bulgara vortaro“; en la jaro 1964: „Gramatiko de Esperanto“ kaj lernolibro.

La Esperanto-bulgara konversacilibro jam aperis kaj oni povas ĝin havigi al si. Ĝi kostas 54 stotinkojn. La konversacilibro estas destinita por eksterlandanoj, kiuj scipovas Esperanton kaj kiuj vizitos nian landon. Por la 48-a Universala Kongreso de Esperanto venos en nian landon miloj da esperantistoj, kiuj povos utiligi la libron. Ĝi entenas multajn necesajn informojn pri nia lando kaj ĝi povas servi ankaŭ kiel gvidlibro. Sed la libro povas esti tre utila ankaŭ al la bulgaraj esperantistoj por perfektigo en la lingvo.

La Esperanto-bulgara vortaro de Ivan Sarafov, Dimitr Simeonov, Kiril Georgiev, Simeon Hesapčiev kaj Georgi Dimov, aperos en la proksimaj tagoj. Ĝi estos tre utila por ĉiuj bulgaraj esperantistoj — novaj kaj malnovaj, ĉar ĝi entenas multajn vortojn, kiujn oni ne povas trovi en la ĝis nun aperintaj vortaroj. Ĝi koston proksimume 2.31 levojn.

La „Gramatiko de Esperanto“ de Violin Oljanov kaj Kunčo Vălev, kiu aperos en 1964, por unua fojo prezentos al niaj esperantistoj en tia amplekso kaj detala pristudo la strukturon de nia lingvo kaj la aplikon de la 16 Zamenhofaj gramatikaj principoj en la varieco de la lingva praktiko. La libro konsistas el kvar grandaj partoj: fonetiko, morfologio, sintakso, stilo kaj metriko. Ĝi estos tre utila por tiuj esperantistoj, kiuj volas koni, ekposedi kaj regi pli detale kaj profunde la lingvon. Ĝi donas multajn frazojn kaj ekzemplojn, per kiuj oni klarigas tiujn malfacilaĵojn, kiujn la bulgaroj renkontas ĉiutage legante esperantajn librojn kaj verkante.

La konata lernolibro de Asen Grigorov laŭ kiu lernis miloj da personoj, dum dekoj da jaroj, aperos en 1964 kompletigita kaj aktualigita. Ĝi estas tre facila kaj povus doni bonajn rezultojn.

ESPERANTO EN LA EKONOMIA LERNEJO „V. LEVSKI“ — PLOVDIV

Longa estas la historio de la Esperanto-movado en nia lernejo komencanta de 1923 jaro. Tiam kelkaj lernantoj ellernis la lingvon spite al la kontraŭstaro de la direktoro. Dum la lernjaro 1932/33 estis malfermita kurso kun 30 gelernantoj — gvidata de la kandidatinstruisto P. Petrov iama lernanto en la komerca gimnazio. Dum la 1936-38 daŭrigis la laboron la konata bulgara esperantisto Iv. Kresta-

nov. Poste en 1945-48 la movado estis revivigita de kamarado P. Petrov. La direktoro Hr. Aleksiev permesis la malfermadon de kursoj kaj li mem subskribis la anoncojn kaj la invitilojn al la gelernantoj por eklerno de la lingvo.

Depost la revivigo de la movado en 1955, dum la kuranta lernjaro 1962/63 estis malfermita okan fojon Esperanto-kurso, en kiu partoprenis 22 gelernantoj, dek personoj el kiuj, ĉefrunte kun-

sia kursgvidanto, aliĝis al la 48-a Universala Kongreso en Sofio. Regulaj membroj al la loka E-societo „Kulturo“ estas 16 personoj.

Okaze de la 1100-a datreveno de la slava alfabeto nia E-grupo aranĝis belan varian ekspozicion de leteroj el diversaj landoj, ilustritaj kartoj kaj vidindaĵoj, fotoj, kovertoj bele afrankitaj de diversaj landoj, multaj libroj, revuoj, gazetoj de aliaj landoj.

Aparte menciinda estas la fotoĵo de ekspozicio de infanaj desegnaĵoj el diversaj landoj aranĝita de E-grupo ĉe granda uzino en Budapeŝto. Inter la ekspoziciaĵoj estas ankaŭ videbla la pentraĵo „Bulgarino en nacia kostumo“, sendita de nia lernantino M. Fingarova de III kurso kune kun ŝia letero.

Nia ekspozicio estis vizitita dum tri tagoj de centoj da personoj individue

kaj grupe. Nia longjara instruisto Penĉo Petrov dum 10—15 minutoj rakontis pri la historio kaj la aŭtoro de la lingvo, pri ĝia reguleco kaj facila el-lerneblo.

Estis eldonita ankaŭ murgazeto „24-a de Majo“ inter kies materialoj troviĝis la artikolo „Bulgaroj en Venecio“ de „Monda Kulturo“ tradukita de nia grupo.

Dum la Festo de la Klereco („Kiril kaj Metodij“) Esperanto-grupo de 26 personoj manifestaciis. Sur la blankaj bluzoj estis videblaj grandaj verdaj steloj, en la manoj—verdaj flagetoj.

Nia senbrua laboro donas bonajn fruktojn kaj ni proponas al ĉiuj lernejoj, kie estas eĉ plej malgranda ebleco sekvi nian ekzemplon.

Marija Bajreva

Karavano de amikeco tra Afriko

LA MESAĜO DE LA FARAONOJ

Parolante pri Kairo mi intence prisilentis du gravajn punktojn el la programo de ĉiu vizitanto de ĉi tiu urbo. Ili estas la vizito al la Egipta muzeo de antikvaĵoj, kaj la vizito al Giza.

La muzeo de antikvaĵoj similas al aliaj muzeoj. Ĝi diferencas de ili nur pro tio ĉar nenie en la mondo estas kolektita tia riĉaĵo de unu el la plej altaj kulturoj de la antikvaj tempoj. La civilizon de Egiptujo ni povas sekvi tra pli ol kvin mil jaroj, ekde tiuj pratempoj kiam la plimulto de la nunaj popoloj ankoraŭ ne ekzistis. La egiptoj de tiu tempo jam sciis skribi kaj konstrui tiajn konstruaĵojn, kiuj povis esti konservitaj ĝis niaj tagoj.

Jen kelkaj belaj ekzempleroj je nur du kilometroj de Kairo. Tie, kie la dezerto komenciĝas, ĉe la limo de la ĉefurba vigla vivo kaj la dezerto sen ia ajn vivo, en la loko nomata Giza, staras tri piramidoj. . . La plej alta el ili estas tiu kiun konstruis la faraono Keops antaŭ kvar mil jaroj. Ĝi estas 146 metrojn alta. Sonas neverŝajne se mi diras ke por ĝin konstrui estis necesaj ĉirkaŭ tri milionoj da ŝtonblokoj pezaj po kelkaj tunoj.

Ofte mi vidis la bildon de tiu piramido en libroj kaj revuoj. Sed kiam mi la unuan fojon staris antaŭ tiu majesta konstruaĵo, mi restis gapanta pro miro.

Estas konate ke la faraono sklavigis centmilon da homoj, kiuj pasigis tutan sian vivon en plej malfacila laboro, nur por krei tombon kiu por ĉiam konservos la postmortajn restaĵojn de la faraono.

En sia intenco Keops ne sukcesis. Alia reganto, kelkajn jarcentojn poste decidis prirabi la riĉan tombon. Ne trovinte la enirejon de la tombo, li traboris ŝtonon kaj tiel penetris en la malvastan koridoron. Post peza laboro liaj homoj sukcesis penetri la ĉambron en la mezo de la piramido. En ĝi ili trovis la balzamitan mumion de la faraono envolvitan en longan tolbandaĝon. Sur ĝi kelkaj maskoj el pura oro, kaj ĉio tio lokita en kelkajn sarkofagojn, unu pli grandan ol la alian, kaj faritajn el ortegita ligno kaj el marmoro. La tuta ĉambro estis plenigita per objektoj el oro, kiuj estus devintaj, laŭ la kredo de antikvaj egiptoj, servi al la faraono en lia postmorta vivo.

Nun tiu ĉambro estas malplena. Kaj dum mi tute kurbiĝinta eliradis tra la tre malalta kaj longa koridoro en la piramido, mi cerbumis pri tio, kiel grava faktoro estis la homa vanto en la historio de la homaro. Por elstarigi sian personon, la faraonoj estis kapablaj sklavlaborigi centmilojn da homoj. Kaj dank' al tiu krueleco, hodiaŭ estas konataj ili kaj la historio de ilia epoko.

Proksime al la piramido de Keops troviĝas la tombo de lia filo Kefren. Antaŭ ĝi kuŝas la fama Sfinkso. Giganta leono kun homa kapo. Majstroverko pro sia beleco kaj grandeco, kiujn ĉiuj vizitantoj admiras. Oni diras ke la Sfinkso iam estis kovrita per dezerta sablo, kaj tiel neniu sciis pri ĝi dum jarcentoj.

Iun tagon pasis tie iu princo, kaj laca pro ĉasado de leonoj, ekkuŝis por ripozi. En la sonĝo la Sfinkso alparolis lin: Ho vojaĝanto, purigu min de sablo kaj polvo kaj miigos vin reĝo de tuta Egiptujo. La princo obeis la misteran voĉon el la sonĝo. Li forigis la sablon kaj malkovris la Sfinkson. Post kelkaj jaroj li vere ekregis Egiptujon. Li nomiĝis Tutmoses la Dua.

Je deko da kilometroj de tiu loko suden, troviĝas la restaĵoj de Memfis, iama sidejo de la faraonoj. Tie eĉ hodiaŭ estas videbla giganta statuo de faraono Ramzes la Dua. La belega arta verko kuŝas en konstruaĵo, kaj la vizitantoj ĉirkaŭiradas ĝin kvazaŭ iun giganton, por ĝin admiri.

Vojaĝante pli al la sudo de Egiptujo oni renkontas multajn antikvajn ruinojn. La plej gravaj el ili estas tiuj en Luksor. Ĉe unu bordo de Nilo estis la pli nova sidejo de la faraonoj. Tiam ĝi nomiĝis Teba kaj estis fama pro sia beleco. Oni nomis ĝin „Centporda Teba“. Ankaŭ hodiaŭ ĉi tie estas videblaj temploj kaj palacoj konstruitaj en grandaj ŝtonblokoj, kun fortaj kaj belege faritaj kolonoj. Ĉiuj muroj estas plenaj je reliefoj zorge ĉizitaj en la ŝtonon. Ili prezentas scenojn el la vivo de la faraonoj kaj de la egipta popolo. Ĉirkaŭ la desegnaĵoj troviĝas sennombraj vicoj da etaj desegnaĵoj: fiŝoj, anasoj, birdoj, palmfolioj, tranĉiloj. Tio estas hieroglifoj, skribo de antikvaj egiptoj.

Ĉe la alia flanko de Nilo troviĝis „La urbo de la mortintoj“. Tie la faraonoj estis entombigataj. Tie ili konstruis ankaŭ templojn por la dioj kiujn ili tiam estis kredantaj.

Ni transiris al tiu bordo. Kelkajn kilometrojn ni pasas laŭ sablaj vojoj, inter krutaj montoj, kie nenia signo de la vivo ekzistas. Subite ni alvenas la Valon de la Reĝoj.

Ni eniras unu el la multaj reĝaj tomboj. La ĉambroj viciĝas unu post alia, ĉio subtere. La muroj estas ornamitaj per belegaj freskoj, kun koloroj tiel bone konservitaj, kvazaŭ hieraŭ pentritaj. Kaj vicoj da hieroglifoj unuj sub aliaj klarigantaj la morojn, historion de tiamaĵa popolo.

Pri tio parolis ankaŭ la multnombraj papirus-strioj plenskribitaj per hieroglifoj, trovitaj en tiuj tomboj, kaj kiuj nun troviĝas en multaj muzeoj de la mondo.

Sed, ĉar la egipta civilizo estis formortinta, kiam oni malkovris tiujn ĉi tombojn neniu povis legi tiun bildskribaĵon. Antaŭ la mondo estis malfermitaj tutaj bibliotekoj da libroj, kaj neniu povis eĉ konjekti kio estas en ili skribita. Multaj sciencistoj provadis deĉifri la sekreton de la hieroglifoj, sed vane. Ili opiniis ke ĉiu bildo prezentas iun nocion.

Nur antaŭ 150 jaroj juna franco laŭnome Ŝampolion sukcesis deĉifri la misterajn desegnaĵojn.

Ŝampolion jam kiel knabo sentis eksterordinaran inklinon al Egiptujo. Krom tio li ŝatis lerni lingvojn. Tutan sian liberan tempon li uzis por lerni lingvojn. Jam en la gimnazio li perfekte sciis latine kaj greke, kaj fervore lernis la hebrean kaj ĉinan lingvojn.

Li pasigis tagojn kaj noktojn studante la surskribaĵojn sur ŝtontabuloj kaj papirusoj kiujn la soldatoj de Napoleono alportis al Parizo. Sed li tute ne sukcesis ion ajn malkovri.

Iun tagon en la egiptuja loko Rozeta estis trovita ŝtontabulo, sur kiu estis skribaĵo en tri diversaj lingvoj: la greka, la hieroglifa, kaj la „Demota“, egipta popola skribo. Ŝampolion komencis komparadi la grekan tekston kun la hieroglifoj, kaj divenadi ilian signifon literon post litero. Ĉar ankaŭ en la hieroglifa skribo ĉiu desegnaĵo prezentas unu literon, sed ne tutan vorton.

Dank' al lia peno, hodiaŭ la egiptologoj povas legi la hieroglifojn. Pro tio ni konas nun la historion de antikva Egiptujo, same kiel la viv- kaj pensmaniero de tiuj homoj el la malproksima pasinteco de la homaro.

Fine ni povis akcepti la mesaĝon de la faraonoj.

Tibor Sekelj

TRA LA GAZETARO

Ni petas ĉiujn sociatajn estrarojn kaj aktivulojn sendi po unu ekzempleron el ĉiu n-ro, en kiu estas publikigita kio ajn pri Esperanto aŭ E-movado. Estas preferinde, ke oni sendu la tutan ĵurnalon. Se oni sendus nur eltranĉaĵon, oni nepre devas skribi sur la marĝenon aŭ en apartan noteton la nomon de la ĵurnalo, la urbon kaj la daton de la apero. Ofte ni ricevas eltranĉaĵojn de kiuj ni povas kompreni nek la nomon de la gazeto, nek la daton.

En ĵurnalo „**Dunavska Pravda**“ — Ruse (17. IV. 1963) — informo de J. Kalinov „Studenta esperantista societo en Ruse“ — pri fondo de tiu societo je la 12-a de aprilo ĉe la Supera Lernejo pri Mekanikigo kaj Elektrigado de la vilaĝa mastrumo. Ĉia nomo estas „Danuba Studento“.

En ĵurnalo „**Dunavski Student**“ — Sviŝtov (24. IV. 1963) — raporto de Velička Vlaeva, studentino, „Ĉiuvendrede en aŭditorio № 3...“ — pri la studado de Esperanto en la Supera Financa-Ekonomia Lernejo en urbo Sviŝtov kun kursgvidanto Bejko Markov.

En ĵurnalo „**Orjaĥovska Tribuna**“ — Orjaĥovo (26. IV. 1963) — en la rubriko „Esperantaj sciigoj“ — oni rakontas pri la celebado de Zamenhof, pri fino de kurso kun kurs-

gvidanto N. Kocov kaj pri vizito de insulo „Esperanto“ okaze de la 19-a TEJO — Kongreso en Vraca.

En ĵurnalo „**Naroden Drugar**“ — Jambol (en numeroj de 1. V., 4. V., 6. V., 8. V. 1963) — aperis la scienc-fantazia rakonto „La globo“ de V. I. Kalianĉuk, publikigita en „Norda Prismo“ kaj tradukita de Dimo Trudoljubov. En ĵurnalo „**Oteĉestven Front**“ — Sofio (12. V. 1963) — longa informo pri 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio kun ĉiuj ĝiaj manifestacioj (festivalo, somera Universitato, junulara kongreso, infana kongreso k. a.).

En ĵurnalo „**Rabotniĉesko Delo**“ — Sofio (15. V. 1963) — artikolo de Iv. Esperov — „En Bulgario okazos internaciaj esperantistaj

renkontiĝoj kaj solenaĵoj" — pri la 48-a Kongreso kaj la granda intereso al ĝi.

En ĵurnalo „**Večerni Novini**“ — Sofio (17. V. 1963) — sciigo ke en la ĉefurbo alvenis la Konstanta Kongresa Sekretario G. G. Pompilio konekse kun la 48-a Universala Kongreso de Esperanto.

En la speciala eldono „**Jubilea Ĵurnalo**“ okaze de la 20-a datreveno de la konstrua lernejo „Georgi Dimitrov“ en urbo Veliko Tŕrnovo (24. V. 1963) — informo „Fenestro al la mondo“ — oni rakontas pri la laboro de la esperantista grupo en la lernejo.

En ĵurnalo „**Literaturen Front**“ — Sofio (24. V. 1963) — artikolo de Kiril Drajev — „Universala Kongreso de Esperanto en Sofio“. La aŭtoro rakontas pri ĉiuj manifestacioj de la 48-a Kongreso.

En ĵurnalo „**Večerni Novini**“ — Sofio (6. VI. 1963) — informo pri la gazetara konferenco, kiu okazis la saman tagon en la Domo de la Bulgaraj Ĵurnalistoj kun prelegoj de

N. Aleksiev kaj G. G. Pompilio pri la 48-a UK. Informoj pri la konferenco aperis ankaŭ en la ĉiutagaj ĵurnaloj „**Rabotniĉesko Delo**“ (7. VI. 1963), „**Oteĉestven Front**“, „**Naroden Drugar**“, „**Trud**“, „**Zemedelsko Zname**“, „**Kooperativno Selo**“.

En ĵurnalo „**Rabotniĉesko Delo**“ (9. VI. 1963) en la artikolo „Festotago de la Rozo-produktantoj“ oni rakontas pri la granda festo en vilaĝo Rozino, kiun salutis ankaŭ la KKS G. G. Pompilio.

En ĵurnalo „**Haskovska Tribuna**“ — Haskovo (4. VI. 1963) — artikolo de Jeko Zapŕjanov „En la tagoj de la 48-a Universala Kongreso de Esperanto — ĉiam pli granda aktiveco“, en kiu la aŭtoro rakontas pri la diversaj manifestacioj kaj pri la agado de la esperantistoj en Dimitrovgrad, kie oni inaŭguros la buston de Zamenhof en la parko „Esperanto“. Por la inaŭguro estas invititaj multaj gastoj el Pollando kaj la nevo de Zamenhof.

ORGANIZA VIVO

SOFIO. Dum sia kunveno je la 17-a de junio la membroj de s-to „M. Gorkij“ aŭdis la raporton de la CK-anino Trajana Petkova pri la internacia korespondado de la bulgaraj esperantistoj. Iuj societoj havas grandegan korespondadon. La societo en Haskovo korespondadis dum la pasinta jaro kun 230 diversaj eksterlandaj korespondantoj el 35 landoj. Viglan korespondadon gvidis la membroj de la vilaĝo Polski Trambeŝ, de Varna, de Sofio kaj multaj aliaj. Ne ekzistas angulo sur la terglobo, al kiuj la scivolema bulgara esperantisto ne sendis la signojn de la bulgara poŝto. Multaj el la ricevintoj profitas la ricevitajn sciigojn pri nia lando kaj presigas ilin en iliaj ĵurnaloj kaj revuoj. Per tio oni ekscias multon pri nia lando, pri ĝiaj malfacilaĵoj kaj sukcesoj. Oni komencas ŝati kaj estimi nin. La korespondado devas fariĝi longdaŭra, enhavoriĉa, altnivela skriba komunikado, interŝanĝo de kulturaj riĉaĵoj,

de spertoj. Tion oni povas atingi multe pli bone per Esperanto, ol per iu ajn alia lingvo — franca, germana aŭ angla. Ĉar la fundamento de la esperantismo prezentas jam firman bazon por amikaj interrilatoj. Valorajn eldirojn faris k-doĵ Nikola Aleksiev, Asen Grigorov, Todor Oŝanski kaj la Konstanta Kongresa Sekretario G. Ĝ. Pompilio.

Stefan Kadiev

LEVSKI. Je la 1-a de junio okazis kunveno de societo „Trumpetisto“, al kiu gastis la asocia sekretario V. Oljanov. Tiu parolis pri la preparoj de la Universala Kongreso kaj la taskoj de la societo. Oni starigis al la gasto diversajn demandojn, precipe pri eldono de lerniloj, al kiuj li detale respondis.

Kina Uzunova

NI KVAROBLIGIS NIAN MEMBRARON

La Esperanto-movado en Stara Zagora en la lastaj 2—3 jaroj rapide kreskas. En 1959 la membroj de la Esperanto-societo „Verda Stelo“ en Stara Zagora estis ĉirkaŭ 50. Dank’ al la bona laboro de la estraro en 1960 kaj 1961 kaj pro la multaj organizitaj kursoj por komencantoj kaj progresintoj naskiĝis multe da geesperantistoj. Krom tio la estraro klopodis maksimume por altiro al la societo de ĉiuj malnovaj esperantistoj, kiuj en la pasinteco lernis Esperanton, sed pro diversaj kaŭzoj provizore malproksimiĝis de la movado.

Membroj de la societo dum la kuranta 1962 estas tiaj elstaraj sociagantoj kiel la sekretario de la Distrikta Komitato de BKP Minčo Ivanov, la prezidanto de la Distrikta Konsilantaro Hristo Kelčev, la distrikta juĝisto Dragija Dragiev, direktoroj de lernejoj kiel Katja Mironova — membro de la estraro, kuracistoj kiel D-ro Kisjova, D-ro Enev, D-ro Spiridonov, inĝenieroj kiel Inĝ. Dobrev — sekretario de la societo, Inĝ. Dimov — ĉefinĝeniero de la Kemia Sterka Uzino, direktoroj de uzinoj, entreprenojoj, prezidantoj de kooperativoj kaj multaj aliaj. Tiuj niaj membroj donas ankoraŭ pli grandan aŭtoritaton de la societo.

Dank’al la klopodoj de la estraro por sukcesplena fino de la kursoj kaj por la varbado de la kursanoj kiel membroj de la societo kaj por la varbado de la malnovaj geesperantistoj en la societo la membraro dum la kuranta 1962 estas preskaŭ 200, kio montras ke dum la lastaj 2—3 jaroj nia societo KVAROBLIGIS NIAN MEMBRARON.

Kaj la atingitaj sukcesoj ne kontentigas nin. La estraro de la societo laboros ankoraŭ pli obstine por altigo de la Esperanto-movado en Stara Zagora sur la necesan nivelon.

Inĝ. D. Dobrev

KUNSIDO DE LA ESTRARO DE BEJ

La 18-an de majo en Sofio okazis plenkunsido de la estraro de Bulgara Esperanto-Junularo. Ĉeestis: S. Simeonov, Al. Dimitrov, E. Keremidčiev, E. Daskalov, J. Angelov, M. Momčev kaj ankaŭ D. Dobrev kaj N. Nikolov — komitatanoj de TEJO. Oni diskutis pri la jenaj demandoj:

1) Stato de la antaŭpreparoj por la TEJO-Kongreso en Vraca. Detalan raporton faris S. Simeonov — prezidanto de la KK. Oni decidis kunvoki la bulgarajn gertoprenantojn en Vraca je la 26. VII. La saman vesperon okazos aŭskultado de la partoprenontoj en la belartaj programoj.

2) Oni aŭskultis raporton de E. Keremidčiev pri lasttempaj kontaktoj kun Hungara Esperanto-Asocio kaj Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio kaj pridiskutis la eblecojn pri konkreta kunlaboro.

3) Oni pridiskutis la junularan paŝon en la asocia organo kaj oni konstatis ĝian nekontentigan staton. Oni decidis aranĝi tiun paŝon ekde septembro 1963 kiel oficialan organon de BEJ. La redaktado estis komisiita al S. Simeonov, D. Ĉolakova kaj E. Keremidčiev.

4) Oni pridiskutis la staton de STELO — la internacia studenta esperantista organizaĵo. Estis decidite diskuti la problemon pri la rilatoj kaj kunlaboro de TEJO kaj STELO en la 48-a UK en Sofio kaj tie konkrete proponi la agadon de STELO en la kadroj de TEJO.

5) Oni decidis fari la necesajn klopodojn por organizi en februaro 1964 la unuan Internacian Seminarion de BEJ sur Vitoŝa.

6) Oni pridiskutis la ĝisnunan agadon de la bulgara esperantista junularo en kunligo kun la kampanjo Jaro de la Junularo. Estis organizita la IV-a Tutlanda Esperantista Junulara Bal-Festivalo en Varna kaj oratora kon-

kurso. Kelkaj societoj aranĝis specialajn kunvenojn dediĉitajn al la Junulara Jaro kaj TEJO. Nun post la apero de la broŝuro pri TEJO tiu ĉi agado estas vastigenda. Estis fonditaj studentaj, esence junularaj societoj en Plovdiv, Svisŝtov kaj Ruse.

La sekvanta kunsido de la estraro de BEJ okazos en Vraca antaŭ la TEJO-Kongreso.

KARLOVO. La jarkunveno de societo „V. Levski“ notis bonajn atingojn. Finiĝis sukcese la tri kursoj por komencantoj kun ĉ. 45 gekursanoj. Sed la plej grava atingado dum tiu ĉi periodo estas la fondiĝo de du lernantaj grupoj — „Sukceso“ kun prezidanto Kunĉo Uzunov kaj „Ni venkos!“ kun prezidantino Nadka Ivanova, kiuj vigle laboras okaze de la internaciaj kongresoj en nia lando kaj la Junulara Jaro.

Cv. Cvetkov

ORJAHOVO. La loka E-societo „D-ro Zamenhof“ renkontis sian jarkunvenon kun plimultigita nombro de la membroj kaj kun propra klubejo, kiu ebligas ankoraŭ pli bonan agadon. Plimultiĝis ankaŭ la abonantoj de la esperantaj gazetoj. La kunveno elektis novan estraron kun prezidanto St. Zlatarski kaj krome nomis la malnovan esperantistan pioniron — k-do G. Stanev honora prezidanto de la societo. La Urba Popola Soveto preparas sin por renkonto de la partoprenantoj en la Internacia Junulara Kongreso okazonta en Vraca, kiuj ekskursos al insulo „Esperanto“ — la unika en la mondo esperantista teritorio.

N. M. Kocev

LOVEĈ. En la stacidomo de Loveĉ preskaŭ ĉiuj fervojistoj lernas Esperanton. Ankaŭ partoprenante laborbrigadon por planti pinarbetojn deko da laboristoj kaj oficistoj parolis kaj kantis esperante. Fervore laboris k-do J. Vojĉev — ĉefo de la varstacio kaj bona esperantisto, Iv. Stojĉev — partia sekretario, Hilda Naĉeva — fervora esperantistino kaj multaj aliaj.

Kina Uzunova

KAZANLÂK. La esperantistaro en urbo Kazanlâk ĉi-jare denove partoprenis la manifestacion okaze de la internacia festo de la laboristaro — la 1-a de majo. Inter ni estis la gelernantoj-pioniroj, kiuj nun lernas Esperanton — kvar klasoj kun pli ol 120 gelernantoj. Nun la celo de la nova estraro de nia E-

societo „Roza Valo“ estas labori por la enrikigo de Esperanto en la uzinoj kaj la lernejoj.

Iv. Zahariev

VRACA. La jarkunveno de la loka E-societo „Sukceso“ pasis sub la signo de la slogano: „Ni perfektigu lingve kaj organize por esti utilaj dum la kongresaj tagoj“. La jarraporton legis la sekretario T. Paŝtrapanski. Li analizis la tutan agadon de la societo kun aparta konsidero de la junularo kaj interalie substrekiis pri la bona socia aŭtoritato de la esperantistoj en la urbo. Kr. Kostov apelaciis pri aranĝo de laborbrigadoj en la estonta parko „Esperanto“ kaj E. Daskalov detale raportis pri la ĉiutaga agado de la junuloj-esperantistoj en la teksa lernejo. Oni proponis ankaŭ kolekti sumojn por la montodomo „Esperanto“ en Vitoŝa. Unuanime en la nova estraro estis elektitaj: R. Triĉkov, Iv. Dimov, T. Paŝtrapanski, Tr. Petkov kaj E. Daskalov.

La 1-an de majo okazis en Vraca majesta manifestacio de la esperantistaro. Pli ol 100 personoj, plejparte junuloj manifestaciis kun konvenaj sloganoj pri la 19-a TEJO-Kongreso okazonta ĉi-somere en la urbo. La bele ordigitaj vicoj de la esperantistoj estis varme aplaŭditaj de la publiko kaj la aŭtoritatuloj.

Enjo Daskalov, Rosica Georgieva

DIMITROVGRAD. Ĉiuvespere ŝildo kun bronzaĵ literoj alvokas la membrojn de societo „Internacia Amikeco“ — Dimitrovgrad al ilia klubejo. Ĉiuvespere kolektiĝas homoj kun diversaj profesioj por dediĉi parton de sia libera tempo al lernado kaj perfektigo en Esperanto. Sub la gvidado de la kursgvidantoj D. Petrova kaj V. Vâlcanov nun funkcias kursoj kun ĉ. 60 gepartoprenantoj. Baldaŭ estas okazonta la inaŭguro de busto-monumento de D-ro Zamenhof en malgranda parko sur bulvardo „D. Blagoev“. En la 48-a UK en Sofio nia urbo estos reprezentita per 35 kongresanoj.

Iv. Zahariev

TÂRNOVO. En la konstrua lernejo en Târnovo funkcias sukcese kurso pri Esperanto sub la gvidado de k-do N. Najdenov. La loka societo „Lumo“ disponigis al la kursanoj specialan montroekston, en kiu ili jam ekspozicias bele afrankitajn leterojn kaj bildkartojn ricevitajn el diversaj landoj.

J. Nikolova

PERNIK. La 20-an de majo nia kara gasto estis KKS de UEA — S-ro G. G. Pompilio, laboranta nun en Sofio por la preparo de la 48-a UK. En la ĉarma maja tago renkontis lin en la stacidomo grupo da esperantistoj. Varme bonvenigis lin la vicurbestro — k-do Petrunov en la oficiala ruĝa akceptejo de la urbodomo. Oni montris al la gasto la vidin-

daĵojn de la urbo: la minejan direkcion, la kulturpalacon, kie estis granda ekspozicio k. a. En la klubejo S-ro Pompilio prelegis antaŭ la esperantistaro, donante informojn pri la antaŭstaranta Universala Kongreso de Esperanto en Sofio kaj konsilojn por nia agado.

N. Mitev

RUSE. Tuj post la jarkunveno, kiu akceptis bonan planon por la estonta agado de la esperantistoj en Ruse, la junuloj komencis ĝin efektivigi. Estis aranĝita printempa Esperanto-Balo. La interesan arangon partoprenis pli ol 400 geesperantistoj. Ludis studenta esperantista orkestro kaj per sia programo la plej junaj esperantistoj amuzis la ĉeestantojn.

Boris Kavalĝiev, Todorka Dimitrova

SOFIO, studenta E-societo „V. Peeva“. La 22-an de majo okazis solena vespero konekse kun la fino de la E-kurso de k-do Bojdar Leonov en la faklernejo pri kaŭĉuko kaj plasto. La kursanoj aranĝis belan ekspozicion. La plej progresintaj kiel M. Jotova, G. Spasova, G. Georgiev, D. Ivanova, At. Madamlieva deklamis kaj rakontis humoraĵojn. La kursgvidanto B. Leonov disdonis diplomojn kaj la prezidanto de la sofia studenta E-societo parolis pri la celoj de la esperantista movado, disdonis la membrokartojn kaj insignojn kaj bondeziris al ili sukcesojn, kiel novaj membroj de la societo. La vesperon oni finis kun dancoj kaj ludoj.

ML. Danev

TROJAN. La estraro de E-societo „Balkana Stelo“ informas pri la forpaso de k-do Minko Dimitrov Topalov — malnova aktiva esperantisto. Niajn kondolencojn!

LA GRAMATIKO PROKRASITA

En la lasta momento ni ricevis la malagrablan sciigon, ke la eldono de la **Gramatiko de Esperanto** estas denove prokrastita por 1965. Ĉar multaj gekamaradoj interesiĝas kaj demandas pri ĝi, ni petas ilin direkti siajn demandojn rekte al la eldonejo, eventuale kun kopio al **Poligrafizdat**, pl. Slavejkov 11. Tio eble estus pli efika, ĉar kio dependas de la Asocio kaj de la aŭtoroj, ĝi estas jam farita. La manuskriptoj estis transdonitaj al la eldonejo jam en 1961. La adreso de la eldonejo: Izdatelstvo „Nauka i izkustvo“, bul. Ruski 6, Sofia.

DEZIRAS KORESPONDI

ISRAELO

Danon Bencion, str. Haim Ozer 13, **Petaĥ-Tikva** — deziras kontaktiĝi kun s-anoj vizitontaj la 48-an UK en Sofio.

JAPANIO

Teruhiko Obajaŝi, ĉe Juho-pensio, 60 Kanomae, Tagamaĉi, **Sendai** — membroj de E-Klubo de Tohoku-Universitato — kun bulgaroj pri ĉt.

POLLANDO

Danuta Kubiak, ul. Mickiewicza 47, **Starchowice**, mezjaraj geedzoj el Pollando — kun bulgaroj por reciproka gastado.

Krystyna Jelonkiewicz (17-jara), str. 22 Lipca 83, **Sosnowiec 3** — kun bulgaroj pri filmoj; Pl.

Zygmunt Cieslak (fraŭlo, 26-jara), **Drozdov** (p-ta Parski, pow. Leczyca, moj. Lodz) — kun bulgaroj pri ĉt; Pl, kantoj.

Mieczyslaw Muszalski, str. Torunska 60, m. 29, **Varsovio** — kun partoprenantoj de 48 UK en Sofio, precipe kun turistoj, kiuj intencas veturi per motorcikloj.

HUNGARIO

Bénik Gyula, Kis u. 4 VAG. — salutkartojn ni atendas el la tuta mondo por nia lertervespero.

Halmágyi Balázs, MSZES. Esperantó Tanfolyam, Mazincbarcika, Jókai tér 1/5 — korespondado per bildkartoj.

Ferenc Hartmann (studento), Rottenbiller ut 50, **Budapest VII** — kun bulgaraj fraŭlinoj pri literaturo kaj sporto; PM, Pl.

GERMANIO

H. Dito Goeres (interpretisto, 27-jara), Viersener Str. 255, (405) **Mönchengladbach** — kun juna bulgarino pri ĉt.

BULGARA ESPERANTISTA KOOPERATIVO

Administracio: bul. „Vitoša“ 40 — Sofio

Ni sciigas al Vi, ke la Filateliea Magazeno de la Kooperativo troviĝas provizore sur str. „Vladimir Poptomov“ 17a, la angulo de str. „Car Boris“ — Sofio, telefono 8-25-79.

Ni disponas grandan nombron da bulgaraj kaj fremdlandaj poŝtmarkoj por kolektoj.

Jen estas kelkaj interesaj proponoj:

N^o 1. Kompleta kolekto de bulgaraj poŝtmarkoj — de la plej malnovaj ĝis la plej novaj (1580 p. m.) Ĉiuj poŝtmarkoj estas ne stampitaj kaj aranĝitaj en du klasifiktekoj. Prezo: 1047 levoj.

N^o 2. Kompleta kolekto de bulgaraj poŝtmarkoj — de la plej malnovaj ĝis la plej novaj (1580 p. m.). 50 poŝtmarkoj estas stampitaj, ĉiuj aliaj estas nestampitaj. Prezo: 615 levoj.

N^o 3. Kolekto de bulgaraj poŝtmarkoj de post 9. IX. 1944 ĝis la plej novaj. Ĉiuj poŝtmarkoj estas nestampitaj kaj aranĝitaj en unu klasifikteko. Prezo: 145 levoj.

Kolektoj — pakajoj de bulgaraj poŝtmarkoj — nestampitaj kaj stampitaj:

222	diversaj poŝtmarkoj	lv.	2.20
333	”	lv.	3.60
444	”	lv.	5.70
555	”	lv.	8.50
666	”	lv.	12.80
777	”	lv.	21.60
888	”	lv.	33.—
1111	”	lv.	62.50
1222	”	lv.	108.—
1333	”	lv.	163.—
1444	”	lv.	242.—
1555	”	lv.	368.—

KOLEKTOJN EN VALORO DE PLI OL 140 LEVOJ NI VENDAS DUM 12 MONATA POPARTA PAGADO. KONTRAŬ ĈIU ENKASIGO NI TRANDONAS (SENDAS) TUJ POŝTMARKOJN 90% DE LA ENKASIGITA SUMO. ĈE ENKASIGO DE LA LASTA SUMO NI TRANDONAS (SENDAS) ĈIUJN RESTINTAJN POŝTMARKOJN DE LA KOLEKTO.

Ĉefredaktoro: Violin OLJANOV

Redakta komitato: Kiril. DRAĴEV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN (vicĉefredaktore)
Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: Delka Ĉolakova

Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66. Tel. 3-26-82